GISTO, DEC, 2007.
George Otto VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ottovaske@ibest.com.br.
ttt-komgrua skribo.

12121212121212121212121212121212121212121212121212121212121212121212121212121212121

AMENHOF-TAGO

Posttagmezede,15ª/DEC/07,15ªh.

Hejme, mia penso vagadas tra la Gaùcholando. Ekzistas pluraj solecaj sxafoj en kies regiono preskaù nur unu verda animo vegetas. Kiam oni telefone kontaktas ilin la plendo sonas: “mi piochas sed daùre restadas la prezidanto de la Solula E-organizajxo. Mi lante perdas la kapablon flue paroli pro manko de kontaktoj inter mi kaj gesamideanoj. Se kontaktoj okazas ja estas pere de INTERNET sed gxis nun ankoraù tro pokaj posedas tian luksan ludilon“. – Aldonas mi: tial ankaù per la sistemoj Skyp, EchoLink kaj aliaj, ne povas okazi refresxigaj babiladoj.Sed, malgraù chio neniu fervora samideano forgesas la Internacian Tagon de Esperanto, 15/12, kaj memorigas al jxurnalaj kolumnistoj, ke la dato estu memorigata. Pro chio chi mi opinias ke, por tia speciala evento multaj soluloj ne domagxus elspezi iom pli ol kutime, por busbiletoj kun la celo kunvivi en mikro-kongreseto.Tiel farigxus la evento, se ili ricevus inviton, kondiche ke ili havus almenaù kelkajn horojn, por lubriki siajn langojn inter gesamideanoj. Kelkaj diris al mi, ke ili ne veturos al PoA; Mi sendis PKn al GEA dirante ke, pro la sxangxo de komuna tagmangxo al kolaziono,15ªh, mi tial ne elspezos por busbiletoj. Kun bedaùro, char GEA ne priatentas la UEA-rekomendon: “infekti” ne-esperantistojn per niaj kunsidoj/babiladoj”. Bufedejo taùgas tiucele kaj ne elspezigus pli ol la evento kostis al GEA.

BREMSISTOJ

Pardonpete mi asertas ke la verda gento murmuras: E-estraroj, per silento, anstataù respondoj al skribajxoj de siaj anoj, dangxere bremsas la movadon. Tute ne estus tiel, ech se oni ricevus rugxan **NEEE !!,** sen pravigo kaj sen klarigo. Gxi sciigas ke la estraro aktivas. Oportune oni ekscios la kialon. – De tri monatoj mi petas informi min, chu mi sxuldas mian jaran kotizon-2007...vane! memoru, ankaù vi, junuloj, oldigxos kaj spertos kvazaù dangxeran forgesemon. Nur atendu! – Chu nia asocia sekretario lernis de deputitoj, dejxori sen labori?

LUIZ PORTELLA

Nia klera amiko, fizikisto Luiz, kiu farigxis federacia chefurbano, debutis en la oficiala organo, en la novembra Esperanto/2007. En la fako “Laste Aperis**”** oni legas strangan titolon: **Sxi estas mia amiko**. Gxi kvazaù fandas la kengon de leganto. Nian eks-rondanon Luiz ni konas. Al li plachas agi iom kontraùdireme, chefe kiam li volas elstarigi ne bonkvalitajn facetojn de la aferoj. Forgesema kiel mi statas, eblas ke lian verkajxon li iam sendis al mi kaj, versxajne, atendis mian opinion aù reagon sed, ne eblis al mi klare vidi la celon de lia malgranda verko.

GXENA DEMANDO

Kiu el niaj karaj gelegantoj plenumis la moralan devon leteri al unu el la restantaj radiostacioj kiuj elsendas programojn en Esperanto?? Chu mi devas ripeti, ke Svisa Radio kaj Pola Radio nelonge antaùe chesigis la elsendojn gxuste pro manko de subteno far aùskultantoj, pere de alskribitaj leteroj? Chu ni chiuj estas dangxeraj hipokrituloj, falsaj homoj kiuj senhonte sin diras ami Esperanton sed ne movas unu fingron, por savi la malmulton da valoraj E-entreprenoj?? Indas memorigi al chiuj esperantistoj brazilaj ke CHINA RADIO INTERNACIA daùras firma, por granda gxojo de la tutmonda esperantistaro sed...pere de la jxurnalo MIKROFONE la legantoj estas petataj ensendi kunlaborajxojn. Tiaj estas valoraj dokumentoj por pravigi niajn chinajn gesamideanojn, kiam ili defendas Esperanton kiel unu el la multaj lingvoj per kiuj ili diskonigas sian landon. Mi nun petis al la estraro de CHO-RO-I, ke ili bonvolu informi min kiom da leteroj ili ricevis de brazilaj samideanoj. Nun mi atendas la respndon kaj tre esperas ke multaj nomoj de gaùchoj trovigxos inter multaj leteroj. Kiu ankoraù ne plenumis sian hejmtaskon kaptu la jarsxangxon 2007/08, por almenaù danki al ili kaj deziri felichan kaj same prosperan novjaron.

KONSTRUAJXO

Mia filo Cid vizitis min 25/12 kaj sciigis ke kvazaù centre de Porto Alegre, che la Strato LimaeSilva ekzistas nova, alta, bele verda konstruajxo, kies nomo estas Esperanto, ke tie videblas grandaj platoj kiuj proponas vendon de apartamentoj. Jen, karaj chefurbanoj, oportuno logxi en aùtentika logxejo esperantista! Sed, domagxo...eble gesamideanoj brazilaj tro malrichas, por acheti apartamenton tie. Ni proponu, ke chinoj akiru tutan etagxon, por instali filion de la oficejo en RIO. La tuta mondo ja scias pri la 10% da jara richigxo de Chinio kaj ke ili povas investi monon en aliaj landoj. Ni komisiu niajn chinajn amikojn, ke ili instigu siajn registarojn investi en Brazilo! Tio malrekte favoros la E-movadon. Ni revu!!

Chu vi vidis?

FOTO en INTERNET

Knabo dekjara genuigxas flanke de sia lito, en la dormochambro plena de elektronaj aparatoj. Lia mieno turnita alten, okuloj fermaj, la manoj kunigitaj en profunda pregxo. Liaflanke, bruna hundo el la raso alnomata kolbaseto, ankaù en pregxa sinteno,okuloj fermitaj, kun la antaùpiedoj sur litorando. Laù mi, bela, kortusxa, rara bildo.

MODERNA PROBLEMO

Du grizuloj intersxangxas ideojn pri modernaj distrajxoj de la junularo, pri Internet, pri gxia trouzo kaj pri gxiaj dangxeraj logajxoj, ktp.

La unua demandas, chu vi konas la rimedon per kiu vi povas bari la aliron de viaj geknaboj al pornoajxoj?

La alia: ne, chu vere? Kaj, kiel mi devas gxuste klaki?

La unua: ho mia kara, tion la infanoj ne instruas al ni.

KUTIMOJ

Homo metas florojn sur tombon. Tuj poste chino metas plenpelvon da rizo sur najbaran tombon. – Chu vi kredas ke via mortinto venos mangxi la rizon?

-- Kaj vi, diras la chino, esperas ke via mortinto venu senti la bonodoron da la floroj?

AKCIDENTO

Asekuristo logas novan klienton. – Chu vi vere neniam suferis aùtomobilan akcidenton?, li demandis. – Nu, diris la kliento: verdire, mi ekkonis mian edzinon en garagxo.